Bolanta Kaldrono

INFORMILO *271 de la*
Esperanto - Grupo Bremen
Julio - Septembro 2004

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen, Tel: 8476806

Vizitu nin en interreto: **www.esperanto.de/bremen**
Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo

Ĉiuj paseroj pepas

de sur la tegmentoj :

La 7-an de julio

estos ĝardenfesto ĉe

familio GREBE.

100 jaroj Esperanto
en Hamburg
La Hamburga Esperanto Societo
festas kaj jubileas!

Akceptu la bondezirojn
de la Esperanto Grupo Bremen.
Ni deziras bonan progreson kaj
feliĉan estontecon.

Nia programo

Tradicia ĝardenfesto !!

La 7 an de julio ekde la 17a horo.
En la ĉedoma ĝardeno la familio Grebe
atendas vin travivi
agrablajn horojn inter gemembroj kaj amikoj.
Familio Grebe regalos nin per kolbasoj, viando kaj trinkaĵoj.
Por bone aranĝi la ĝardenfeston necesas via sufiĉe frua aliĝo!
Laŭ deziro vi povos kunpreni iun salaton.

Familie Grebe stellt Würstchen, Fleisch und Getränke zur Verfügung. Damit geplant werden kann melden Sie sich bitte zeitig an!
Wer möchte, kann gerne einen Salat mitbringen.

Bv. anonci vian partoprenon. Tel. 396 34 80
(La ĝardenfesto okazas: Bremerhavener Str. 112)

Vi estas tre bonvena.

En aŭgusto ni feriu!! **Ni deziras al vi tre agrablan tempon**
kaj sanan revidon en septembro!

Diskutoj pri aktualaĵoj

La 8-an de septembro.
En nia kunvenejo je la 20-a horo.
Aranĝas kaj gvidas **Kurt Meyer.**

Feriatempo = feliĉa tempo

La 13an de oktobro je la 20-a horo en nia kunvenejo Brodelpott.
Ĉiu povas raporti pri siaj feriaj travivaĵoj kaj eĉ prezenti bildojn.

Retrospegulo

La 14-an de aprilo en nia kunvenejo: Visitanto el Bona Espero

Clarimundo Barbosa Neto vizitis Bremenon kaj nian grupon dum sia rondvojaĝo tra Germanio. Estis jam la tria fojo (dum pluraj jardekoj), ke ni havis la okazon ricevi originalan raporton pri la infanvilaĝo Bona Espero. Clarimundo vivis tie dum pluraj jaroj kaj vizitis la elementan lernejon. Nun li vivas kaj laboras en la ĉefurbo Brasilia, tamen li tenas bonajn kontaktojn al la vilaĝo, kiu peris al li multajn sciojn kaj ankaŭ sintenojn.
Li montris al ni multajn bildojn pri la ĉiutaga vivo kaj pri festoj aŭ muziko, pri la konstruaĵoj, la ĝardeno ktp. Li alportis la impresajn bildojn sur diskoj, kaj ni sukcesis videbligi ilin sur ekrano per "beamer",
Alveninte la 13an de aprilo Clarimundo estis gastigita de familio Kruse, kiu "transdonis" lin merkrede al mi. Post aĉeto de fervoja karto (rabato por la tuta rondvojaĝo) mi gvidis lin tra la urbo al kelkaj vidindaĵoj. Estis tre agrable babili kaj diskuti kun li, ĉar li estis malferma por ĉiuj temoj. En malgranda ekskurso per biciklo mi montris al li la stacidomon, la civitanan parkon, la Universon (pro tempomanko nur de ekstere) kaj parton de la tipe bremena ĝardenkulturo de la parceloj.
Precipe menciinda estas la fakto, ke en nia grupvespero ĉifoje partoprenis entute 23 personoj! Tian amason ni jam delonge ne plu vidis en nia klubejo. Krom la gastoj de la **Esperanto-grupo Subvisurgo** ni precipe ĝojis pri la ĉeesto de sinjorino **Nordwall** el Vegesack, kiu dum longa tempo ne havis kontakton al aliaj geesperantistoj.
Do, entute ĝojiga aranĝo, kiu ankaŭ kuraĝigis nin plue subteni la infanvilaĝon en Bona Espero. Koran dankon, Clarimundo, pro via prelego kaj bildprezentado!

Hellmut Grebe

La 20-an de majo: Nia Maja Ekskurso al Hagen

18 ekskursantoj renkontiĝis sur la parkejo de la kastelo Hagen. Ni estis surprisita pri la amaso da homoj kaj rajdantoj antaŭ la kastelo. Tentoj, grandaj kolbasrostiloj kaj multaj tabloj kun seĝoj estis tie aranĝitaj. Sur enkadrigita loko ĉevalgalopis rajdantoj tra pordego kaj klopodis per bastono kapti ringojn. Do, estis rajdanta festo, evidente instalia por ni.
Afabla ĉiĉerono atendis nin por unuhora gvidado. Unue li atentigis nin pri la brikoj el diversaj epokoj. La plej aĝaj estis en monaĥformato. Ni iris ĉirkaŭ la 500-jara kastelo, kie oni povis ekkoni, ke sur alta plialtigo la kastelo estis konstruita. Poste li gvidis nin en beletan mezepokan salonon. Jen ni trovis seĝojn kaj aŭskultis lian prelegon pri la historio de tiu konstruaĵo. Temis pri episkopoj, kiuj ĉi tie perforte postulis la dekonon de la kamparanoj kaj ankaŭ la same perfortaj kontraŭagoj. Ek de kelkaj jaroj oni klopodas sukceso savi tiun valoran historian juvelon. Laste ni estis en la impona volbaja kelero, kiu nun servas por kulturaj aranĝoj, Ni rigardis fine la ekspozicion pri « figuroj el lumo kaj ombro ».
Post la kafotrinkado ni marŝis tra la belega naturo ĉirkaŭ la kastelo. La regiono estas tiel bela kaj ripoziga ke plurtaga restado invitas.
Hellmut Grebe aranĝis denove tiel sukcese kaj bele tiun Majan Ekskurson, ke ni tre kore dankas pro liaj klopodoj, kiuj sendube kostis tempon kaj cerbumadon.

Dieter Hartig

Koran Bonvenon

Kun aplaŭdo ni eksciis dum la Maja Ekskurso, ke sinjorino **Haidrun Nordwall** **a**liĝis nian grupon. Ni ĉiuj tre ĝojis, ĉar sinjorino Nordwall jam trovis sian lokon inter ni.
Sinjorino Nordwall lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj kaj kapablas ankoraŭ Esperanton tre flue. Ni deziras al vi ĝojon kaj kontentecon en nia rondo.

El malnovaj vortaroj

(Leksikologio, difino, meditado)

Brockhaus – Enzyklopädie 1876 Sub **Antropologio**

Difino:

Ankoraŭ troviĝas la homo, rilate al naturpriskribo, sub la bestoj, sed tio estas en lasta konsekvenco ne decidita., ĉu la homo estas sur la pinto aŭ sur dekstra flanko.
Ĝenerale oni diferencas la homon de bestoj precipe pro la psikaj kapabloj (animaj kapabloj): Intelekto kaj prudento, kiuj ja mankas la bestojn. Tio estas la kaŭzo, ke oni kalkulas la homojn ne en la zoologion.
El tio oni povas supozi, ke estonte la antropologio, ĉe plua esploro, estas pli alta ŝtupo en la sistemo de la naturscienco, same kiel la zoologio havas pli altan rangon ol la botaniko.

Meditado:

Per la pioniraj esploroj de Darwin (1871) glitis la homo nerevokeble en la zoologian sistemon sub la mambestoj. Kiel spezialaj kvalitoj menciindas: La vertikala irado, la plej alte evoluita cerbo kaj la plej diferencigita lingvokapablo el inter ĉiuj vivestaĵoj. Rimarkinda estas, eble, ke la homo malofte uzas siajn eksterordinarajn kapablojn favore al sia propra speco.

Ni rigardu nun al la Homo sapiens >>>>>

Brockhaus Enzyklopädio 1878
Sub **Homo (Mensch)**

Difino:

Laŭ sia korpa aspekto apartenas la homo sendube al speco de mambestoj, al la tipo, kiu sur malalta stupo estas reprezentata per simio. La homo difeencas de simio precipe per ekstremaĵoj kaj cerbo. Prudento estas la plej menciinda trajto de homo.
Akiraĵoj de la homa prudento ne meritas la unuopan individuon, sed precipe la gento. Evoluiĝis el la prudento la komuna vivo en familioj kaj la prudenta divido de laboro, rajtoj, religioj, ŝtatoj kaj aperas la kultura ideo de komunumo.

Meditado:

La 1878 per prudentkodo ordigita mondo estis en la 20-a jarcento per homa fiasko plurfoje kaj ekzistominace la moralaj fundamentoj ekskuitaj.
Kaj nur malrapide reaperis la espero. Per la tutmonda agado de la 3-a jarmilo devas esti la "batalo pri ekzistado" pacema kaj prudenta.
Alikaze postvivas nek la homo nek la mondvasta ekonoma partnero.

Dieter Hartig